

bulteno

de Esperantista Klubo en Prago 3/1993
de Esperantista Klubo en Brno 2/1993 (204)

Osada Bona Espero v Brazilii

Pět brazilských esperantistů hledalo v roce 1957 klidné místo pro charitativní účely. Beznadějný osud sirotků a mladých provinilců ve velkých městech Brazílie je podnítil zkoumat možnosti jak pomoci alespoň několika bídným. Zakoupili pro tyto účely pozemek asi 200 km vzdálený od hlavního města Brasilia. Na pozemku rychle vyrostl obytný dům a vzápětí i budova školy pro negramotné. Do osady byli přijati první osadníci - chlapani a děvčata ve věku 10 - 16 let.

Příjezd manželů Grattapagliových, kteří sem přišli pracovat z Milána, znamenal další změny v koncepci vedení osady. Nyní jsou zde vychovávány děti z blízkého okolí, přibližně do 40 km. Pozemek má v současnosti rozlohu 10 km a stále je rozšiřován. Jako internát pro 25 dětí slouží "Bílý dům" a stejný počet dětí sem denně dojíždí. Rekonstruována a rozšířena byla i budova školy. Ve škole jsou vyučovány vedle mnoha dalších předmětů portugalština, matematika, dějepis, biologie, zeměpis a esperanto.

Odpolední práce na zahradě spojuje žáky nad zeleninovými záhony. Učí se kopat, sít, hnojit a při obdělávání půdy manipulovat s malým traktorem. K novému domu přibýly místnosti dokonale vybavené novým pracovním nářadím a jednoduchými stroji. Navštěvovat devět let školu s možností získat vedle základního vzdělání i základní praxi řemeslné výroby je jedinečnou příležitostí. Absolventi školy z osady Bona Espero se již uplatnili jako zaměstnanci obchodních domů, pošty, telefonní ústředny a u místní policie. Žáci jsou zde vychováni rovněž k ekologickému citění: slunce, voda a vzduch jsou nejlepšími spolupracovníky. Na střeších domů byly instalovány panely slunečních kolektorů na nejvyšším místě náhorní roviny. V posledních letech nebyl skácen ani jediný strom. Zásobování vodou je zabezpečováno pomocí gravitační pumpy, která vodu zvedá z jezera výše než 20 m pro domy, zeleninovou zahradu i pro zavlažování ovocných stromů.

Jen díky morální, finanční i fyzické podpoře esperantistů bylo možno založit osadu Bona Espero a později zdejší školu a školní statek dovést k prosperitě. Rovněž manželé Grattapagliovi jsou známí esperantisté. Paní Ursula Grattapagliová byla řadu let redaktorkou nejrozšířenějšího esperantského časopisu Heroldo de Esperanto a její manžel byl jedním z manažerů Fiatu. Z jeho podnětu dal Fiat natočit v esperantské verzi 11 propagačních filmů a v esperantu vydal desetitisíce výtisků propagačních publikací o své činnosti.

Josef Vondroušek

27. února 1993 zemřel Juan Régulo Perez, universitní profesor a spisovatel, jedna z největších osobností esperantského hnutí, po Dr. L. Zamenhofovi, H. Hodlerovi, E. Privatovi, K. Kalocsayovi, I. Lapenovi a G. Waringhienovi. Odvážil se být antifašistou ve fašistickém státě. Po deportaci se usadil na Kanárských ostrovech, v La Laguně, kam fašistický režim nedoléhal tak tíživě. Universita, kde vyučoval, jej uctila monumentálním dílem "Serta Gratularia". Jeho vydavatelská činnost pod zn. "STAFETO" měla nesmírně pozitivní vliv na rozvoj esperantské literatury. Vydal 93 děl, mimo literaturu psanou originálně v esperantu i překlady vrcholných děl světové literatury do esperanta, například také Křest sv. Vladimíra od K. H. Borovského v mistrovském překladu Dr. T. Pumpra. Vydal rovněž několik obsáhlých studií o své vlasti - za tu považoval Kanárské ostrovy.

První společný kongres Českého esperantského svazu a Německého esperantského svazu se konal ve dnech 29. - 30.5.1993 v hotelu Thermal v Karlových Varech. Kongresu se zúčastnilo na 400 osob. Kongresový program, jeho pracovní i kulturní část, byl velmi dobře připraven. Po společném slavnostním zasedání se uskutečnila oddělená zasedání obou svazů,

zasedání sekcí (lékařů, vědecko-technické, učitelů, sběratelů, křesťanské, pro pomoc Zaire aj.). Pracovní jednání Českého esperantského svazu projednalo výsledky práce v roce 1992, hospodaření svazu, schválilo nové stanovy ČES a zvolilo nový řídicí orgán svazu. Předsedou českého esperantského svazu byl zvolen Ing. Vlastimil Kočvara. Kulturní večer byl zahájen světovou premiérou esperantské verze divadelní hry Václava Havla "Audince" podle překladu J. Vondrouška, v provedení vynikajícího německého souboru "Kia Koincido", pokračoval koncertem operního zpěváka M. Smyčky, a byl zakončen vystoupením E.Seemanové, která přednesla dvě povídky z Knihy apokryfů Karla Čapka. V dalším společenském večeru se postarali o zábavu dva iluzionisté: L.Rýznar a jeho německý kolega Bernard Schonberner.

Z kanceláře prezidenta republiky, Praha-Hrad, obdržel J. Vondroušek dopis od prezidentovy tajemnice, paní Anny Feimanové: "Vážený pane Vondroušku, děkuji Vám srdečně jménem pana prezidenta za překlad jeho hry Audience do esperanta ..."

Ruské vydavatelství "Sezonoj" vydá ještě v tomto roce esperantské vydání románu "Zločin a trest" F. Dostojevského.

V slovenském Pedagogickém vydavatelství vyjde v příštím roce velká učebnice esperanta, výsledek kolektivní práce PhDr. M. Šaturové, E. V. Tvarožka a PhDr. F. Šatury.

Brněnské loutkové divadlo Radost získalo před třemi lety první cenu na záhřebském loutkovém festivalu předvedením hry E.F.Buriana "Dorota" v esperantském překladu M.Malovce a J.Vondrouška. V minulém roce připravilo novou hru v esperantu: Doktoro Fausto podle textů lidových loutkových her. Autorem esperantského překladu je M.Malovec, který zachovává všechna specifika českého originálu. Soubor Radost předvedl tuto hru jak v německém tak v esperantském překladu na mezinárodním loutkářském festivalu v Klagenfurtu a získal třetí cenu.

V současnosti je vydáváno 198 různých periodik v esperantu. Počet esperantských časopisů v důsledku velkého zdražení v poslední době poněkud poklesl, přesto je jich vydáván na celém světě různými organizacemi i soukromníky značný počet a některé jsou neobyčejně výpravné.

Mše v esperantu se pravidelně slouží v Polsku v Bydgošti, Krakově, Sopotech, Sosnovci, Varšavě a ve Wroclavi.

La 6-an de septembro 90-jariĝos membro de Esperantista klubo Praha 8-ano Zahradník. Ĉion plej bonan, firman ŝanon kaj bonan humoron deziras al li ĉiuj membroj de la klubo.

Programoj de la klubaj vesperoj:

Esperantista klubo Praha

regule ĉiulunde de la 17.30 ĝis la 20.00 h en la klubejo en Vejvodova-strato. Se okazos ŝanĝo de la klubejo, tiam ĉiuj membroj estos ĝustatempe informitaj.

SEPTEMBRO:

- | | | |
|-----|---|-----------|
| 6. | Internacia Tago de Paco | J. Patera |
| 13. | Mia ĉi-jara libertempo | ĉiuj |
| 18. | - sabate - Ekskurso al Neumětely. Venu multnombre!
El la stacidomo Smíchov, per trajno 9.45 al Zadní Třebáň
10.15, de tle je 10.56 al Neumětely 11.43 h. | |
| 20. | Ĉu vi ŝatas polipojn? | J. Mařík |
| 27. | F.L.Věk de Jirásek en traduko de J.Chvosta | J. Patera |

OKTOBRO:

- | | | |
|-----|--------------------------------|-----------|
| 4. | Internacia mon-sistemo (speso) | J. Mařík |
| 11. | Vespero de anekdotoj | ĉiuj |
| 18. | Jaroslav Hašek | J. Patera |
| 25. | Ĉeĥa nobelo Kryštof Harant | J. Mráz |

Esperantista klubo Brno,

Šilingrovo nám. 3/4, SPOJKLUB, Ĉiumarde je la 18.30 h

SEPTEMBRO:

- | | | |
|-----|--|--------------------------|
| 7. | Postferia rememorado | komune |
| 14. | La restado en Palma Riviera (diapozitivaj) | L.Huf, Ivanovice na Hané |
| 21. | Signifo de difektoskopio | A.Baláš |
| 28. | Popolaj kantoj en Esperanto (kantado) | Inĝ.K.Daněk |

OKTOBRO: * * * Komencas kursoj de Esperanto * * *

- | | | |
|-----|--|----------------------------|
| 5. | Já, Alžběta Rejčka, někdy královna česká;
Du apokrifoj de K.Čapek | E. Seemannová, Praha |
| 12. | Tradicia kaj moderna medicinoj | RNDr.Ing.J.Šikula, CSc |
| 19. | Lingvo de ŝtonoj | Š.Roušková, Říčany u Prahy |
| 26. | Vespero plena de sorĉoj | L.Rýznar, Svitavy |

V úhledné knížce Viktora Fischla "Hovory s Janem Masarykem" jsme si rádi přečetli: "Já mám rád lidi, co májí nějakého koníčka. Ono na tom nezáleží, jestli sbírají známky, kaktusy, motýly nebo popelníky. Já nemám nic proti numismatikům, pokud je nezajímají jen dolary, libry a koruny. Já mám rád esperantisty a vegetariány a lidi, co mají plný barák koček a psu a lidi s akváriem, se stovkami detektivek a lidi, co mají ježka nebo želvu nebo špačka. Lidi s herbáři, loutkaře i fotbalové fanoušky. U těchto lidí já aspoň vidím, že mají něco v životě rádi ..."

V blízkosti Elyzejských polí, uprostřed 50-poschod'ových mrakodrapů, se nachází v ohromném kupolovém domě kongresový palác CNIT. V jeho hale, rozsáhlé jako hlavní městské náměstí, je umístěna nejelegantnější kvavárna-restaurace. Má název Esperanto.

Jaroslav Mařík:

90 JAROJ DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA (fina parto)

Vespero de nacioj, okazis en la klubejoj, ĉefe en Louvre, ekz. kataluna, japana, finna, belga, nederlanda k.a., kun ĉeesto de ambasadoroj tiulandaj aŭ konsuloj; la finnan ĉeestis la ĉeĥiginto de Kalevala, verkisto Josef Holeček.

En la j. 1960 kluba delegacio kunsidis kun la **vjetnamia ambasadoro** en Moskvo, s-ano Nguyen van Kinh, en alia jaro kun la renoma sovetia esperantisto, el la Lingvosciencia instituto, **E.A. Bokarev**.

Jaro 1987: 100 jaroj de Esperanto - la klubo plantis en la Herold-parko, Vršovice, tilion kiel "Esperanto-arbo" kaj malkovris memorŝtonon dulingvan (ĝi kostis 22 000 kronojn!) - En la 70-aj kaj 80-aj jaroj junaj klubanoj partoprenis unuamajajn manifestaciojn kun verda flago kaj nomtabulo. 26. X. 1988: navigo sur Vltava per "danc-ŝipo". Samjare, Kulturdomo Na Vartě, Měcholupy: aktiva partopreno de klubanoj ĉe **filmado pri esperantistoj**, fare de Krátký film. (Bedaŭrinde, tiu ĉi kolora filmo ne venis en kinejojn - tiuj devus mendi projekcion!) - Baldaŭ post 1945 okazis kluba vespero en la palaco sur Slava insulo kun la E-poeto Reto Rossetti, kie li omaĝis al la literatura arto de nia d-ro Tomáš Pumpr. - En la 50-aj jaroj la klubo aĉetis por siaj kulturaj aktivecoj disaŭdigilon (kostis 15 000 Kčs: uzita en la teatro Ve Smečkách, sed poste pro klubana malzorgo ĝi perdiĝis).

Elstaraj vizitoj el eksterlando. Krom la jam menciitaj: prelego de mondvojaĝanto Joseph Scherer, Usono, en Městská knihovna (Urba Biblioteko), Hans Jakob, direktoro de UEA en Ĝenevo. Akademiano Ariste (universitato Tartu), Nazim Hikmet vidis sian teatraaĵon Legendo pri amo (Ve Smečkách), doc. Vaitilavičius (Vilnius), d-ro Ledo Medvedev, N. Aleksiev (MEM-prezidanto).

Inter la klubanoj estis kaj estas verkistoj kaj tradukintoj de eldonitaj verkoj; ni nomu Ŝupichová, Kamarýt, Hromada, Bouška, Ginz ..., dum la lastaj jardekoj Urban, Urbanová, Karen, Rumler, Vidman, Seemannová, d-ro Horský, Mařík, Kníchal, d-ro Kavka. Literaturan sektion de ĈEA dum kelkaj jaroj gvidis Karen. Klubano Dolfa Bartošík ricevis 32 medalojn kaj diplomojn en-kaj eksterlande pro sia unika kolekto filatela (Internacia lingvo en filatelo). Bartošík estis ankaŭ internacia Ĉe-instruisto kaj en Nederlando trovis sian edzinon Ine. Denaska Esperanto-parolanto estas filino de Kavka.

Honoraj membroj de EAĈSR, ĈEA kaj de la Klubo estis, laŭmemore: Bárochová, akademiano Pumpr, Ŝustr, Mařík (EK, ĈEA, UEA), Ŝustrová, akademiano Urbanová, Seemannová. Ŝupichová estis honora membrino en sep societoj (inkl. EAĈSR kaj UEA). Honoraj EK-prezidantoj (laŭmemore): Ŝustr, Mařík.

Elstaraj personoj de la klubo, almenaŭ kelkaj: d-ro St. Kamarýt, kun poeto S.K. Neumann kunfondinto de la klubo, d-ro Aug. Pitlík (fondis Instituton de E-o, direktoris Someran E-Kolegion en Doksy), Ed. Kühnl (fondis la "Union"), Bouška (lia "Slovakoj kaj Magiaroj" tradukita en 10 lingvojn), Oto Ginz, poeto kaj tradukanto R. Hromada, d-ro T. Pumpr, D. Bartošík kaj aliaj supre menciitaj, Slanina, Jos. Vítek, redaktoro de Bulteno, inĝ. Sviták, F. Staněk, F. Brandejs ("elbatalis" la nunan klubejon), d-ro Ivo Železný (nun posedanto de la plej granda eldonejo en Praha), d-ro Zázvorka (direktoro de Nacia muzeo), T. Balda (sekretario de MEM), Antoni Seemann (aktoro, reĝisoro); la plej karakteriza figuro: Jaroslav Ŝustr, kluba prezidanto dum 27 jaroj, mecenato, laboregulo, ekz. en 1967 li forsendis 8 035 klubajn poŝtaĵojn; al li ili venadis en poŝta sako ... Ĉefe li plenumadis petojn el eksterlando, ekz.: Cejlono, Belgio, Japanio, Indonezio, Britio, Kanariaj insuloj, Ĉinio, Maroko, Vjetnamio, Sovet-Unio, Israelo, Gvatemalo k.a. (La gvatemala ministerio de kulturo honoris lin per diplomo.)

Granda amo de Ŝustr estis la kluba biblioteko, kiun li kreskigis de ĉ. 2000 al 6100 ekzempleroj. Li dufoje ĝin savis de pereco (sub la neamikaj reĝimoj). La klubo donis al ĝi honoran titolon "Esperanta biblioteko Jaroslav Ŝustr de Esperantista Klubo en Praha".

El la **antaŭmilitaj membroj** de EK ĝis nun vivas tri: Ladislav Kynčl, Václav Lorenz, Jaroslav Mařík. Eble ankaŭ Zahradník, nun preskaŭ 90-jara.

La kluba membro-bazo: en 1946 ĝi havis 500 kotizantojn, el tio 93 studentojn altlernejajn,

en 1949 rekordo: 511 registritaj membroj. En 1959 la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato ordonis eksigi ĉiujn eksterpraganojn. 1971: 420 membroj. En 1970: 3 142 personoj vizitis la klubon, el tio 91 el aliaj 22 landoj.

La kluba BULTENO: post la deviga nuligo de la klubo, en 1950, ĝi fariĝis nura Zájmový kroužek. Osvětové besedy (Fak- aŭ Interes-Rondeto de OB); ĝi tamen transprenis sur sin taskon de interkluba informanto en ĈSR, pere de sia Bulteno. Tre bone redaktitaj 50 numeroj (J.Vítek) estis dissendataj en ĈSR kaj eksterlanden, ekz. 735 ekzempleroj al 30 landoj kaj insularoj de 5 kontinentoj, fine eĉ (j.1957) 2 100 ekzempleroj. La ekspedado estis, eblas diri eĉ ĝuiga, memvola tasko de s-ino Bárochová, la "panjo de vojaĝantaj esperantistoj". La Bultenon alte aprezis la kanaria eldonisto prof. Régulo Pérez kaj la skota E-poeto W.Auld.

"Verda Ĉaro de Julio Baghy". Apartan ĉapitron de la kluba kulturo reprezentis, bedaŭrinde nur inter 1954-59, la VĈJB, teatra kaj artisma kolektivo de EKP. Inspiris ĝin, fondis kaj gvidis, kun sia edzo Antonín Seemann, s-anino Eva Seemannová. Mi ne hezitas diri, ke la VĈJB, kune kun la Verda stacio de Radio, fondis en la mondo la Esperantan teatran kulturon. (Neniam pli frue la mondo spertis tion.) En la prezentadoj de VĈJB, en "Malá scéna", Ve Smečkách, rolis aro da instruitaj klubanoj, ekz. d-ro Sádlo-Páv, J. Ondráček (tiujn mi memoras precipe kiel prof. Higgins kaj kolonelon Pickering, en la bonega "Pigmaliono" de G. B. Shaw), s-ino Nývltová (patrino), Eva Nývltová-Řiháčková, Kalivoda, Novotný, Mařík, Novobilský k.a. - Ĉiujn teatraĵojn esperantigis Eva Seemannová. Aliaj tre aprezindaj dramoj estis Legendo pri amo (Hikmet), Maryša (fratoj Mrštík), Nora (Ibsen), La patrino (K. Čapek) kaj pluraj aliaj. Julio Baghy donis, tiel dire, patran benon al VĈJB, verkinte por ĝi du teatraĵojn. Unuafoje en la mondo estis prezentita sur scenejo la figuro de L.L.Zamenhof en aŭtentika redono fare de d-ro Sucharda (eksedzo de Seemannová). La Pigmalionon la VĈJB prezentis ankaŭ al tri mil partoprenantoj de la UK en Varsovio, 1959, kun ega sukceso, kiu rezultigis inviton al posta UK en Bruselo (sed oficoj malebligis). Sed ve, trafis nin ankaŭ persekutado fare de la Ŝtata polico kaj VĈJB ĉesis (1959, per lasta ripeto de Pigmaliono, en Prago) ... Ho, kiomfoje ni en nia historio devis, pro desupra volo, ĉesigi nian promesplenan aktivadon! ...Ja sekvis eĉ familia tragedio (Staněk).

La laboro plenumita de la VĈJB kaj de ĝia motoro Eva Seemannová neniam estu forgesata! (Mia resumo pri la historio de VĈ: Bulteno 4/1974). La sukcesoj de VĈJB trovis atenton en la moskva revuo Teatr, vjetnama literatura gazeto, hungara teatra revuo Színház és Mozi, Ilustrowany Kurier Polski, brita Daily Worker.

Jaro 1968: sub la influo de la "Praga printempo" la klubo denove povis memstariĝi kiel Esperantista klubo. Tamen, en 1970, pro ordono de la Nacia Komitato de Prago, ĝi devis ĉesi kiel memstara kaj fariĝis loka organizaĵo de ĈEA. (La ofico: "En la urbo ne rajtas ekzisti du Esperantaj organizaĵoj!"). Jen frukto de la komunisma "renormaligo".

Rekonoj al la EKP: nia klubo atingis kelkajn rekonajn fare de instancoj: en 1906 ĝi tiel vaste propagandis, pere de la londona klubo, la ĉeĥan fakon de la "Tutaŭstria ekspozicio en Londono", ke ĝi ricevis diplomon de la Ĉeĥa Nacia Konsilantaro kaj en 1907 la Konsilantaro rezervis en sia poreksterlanda sekcio unu postenon por membro de EKP. - En 1949, la anglalingva elsendo de RADIO PRAHA raportis pri kluba festo de 45 jaroj de E-o, en la teatro Ve Smečkách (Semafor); ĝin ĉeestis i.a. la ekiskopo de la Ĉeĥoslovaka eklezio evang., d-ro Novák. - La franca redakcio de Radio Prago elsendis franclingvan intervjuon pri kluba agado rilata al francio, kun Šustr kaj Mařík. "Franca esperantisto" en 1958: "Ni gratulu kaj imitu niajn Pragajn gesamideanojn!" - Du teatraĵoj de A. Seemann gajnis tri premiojn en Internacia Belarta Konkurso, Haarlem, 1954. En postaj jaroj en tiu Konkurso estis premiitaj ankaŭ E.Urbanová kaj J.Karen.

Kontribuo de EKP al la pluekzistado de la Movado en la totalisma ĈSR (1950-aj kaj 60-aj jaroj).

Dum la nazia okupacio kelkaj fidelaj membroj, precipe Šustr, kunvenis vespere, dum la estinta kutima kunven-tago, en nia iama "hejmo", la kafejo Louvre (Národní tř.), inter la aliaj gastoj, nur por interŝanĝi novaĵojn ktp. Post tempo la kelnero avizis nin, ke pasintfoje serĉis nin tie la gestapo kaj enketis la kelneron pri esperantistoj. Tiu rediris, ke neniu kunvenadas en ilia kafejo. (Mi memoras inteligentan junulon nekonatan, kiu komencis venadi inter ni, kun aserto interesiĝi pri

Esp-o. - Mi rekonis lin post jardekoj, kiam okazis (dum la komunisma reĝimo) ia studenta protesta kunveno apud la Mácha-statuo. Ĉu hazardo, aŭ ne - ĝi ja estis sub Petřín? Li asplektis kvazaŭ ruino...)

Post la likvido de AEĈSR (1952) la klubo fakte parte plenumadis ĝiajn taskojn klopodante teni kontinuecon de la lokaj unuoj, per vasta korespondado (Ŝustr) kaj tutlanda dissendado de sia bonkvalita (laŭenhave) Bulteno. Tio kaj la aktivado de R.Burda en Plzeň (pere de sia internacia bulteno La Pacdefendanto) kaj same la tiama admirinda vigliĝo de la esperantista junularo (studtendaroj, jarkonferencoj k.a.) kun "Centrejo" en Opava (tiam: Kuzník, Solnický, Novobilský) malhelpis kolapson de la Movado. Burda sukcesis reveki iom post iom esperantismon en la "popoldemokratiaj landoj", sed ankaŭ en USSR semoj ekĝermis (ekz. prof. Bokarev). La kluba junularo akiris en 1955 propran klubejon, en la Římská-strato. La aktiveco kompreneble ne plaĉis al la Ŝtata polico, kiu komencis grave ĝeni la funkciulojn.

Malĝoja ĉapitro: persekutado

Minimume unu klubano estis ekzekutita dum la nazia okupacio. Dum la totalisma reĝimo, post 1948, klubaj reprezentantoj estis persekutataj (plejparte sekrete) fare de ranguloj de la Ŝtata polico (Stb); al iuj estis dirite, ke okazos "vasta arestado". La motivo estis daŭranta kontaktado kun la eksterlando. - Tiutempe ne ekzistis komitato kluba kaj prezidanto: la ranguloj ne rekonis ilin, kaj respondeca antaŭ ili estis sole la "gvidanto" de la Rondeto.

Jaroslav Ŝustr, la "gvidanto" devis pasigi 93 tagojn en esplorarestejo pro supozata kulpo pri spionado (fine kulpo ne trovita). Vuk **Echtner**: 2 kaj duona jaro da karcerio, en Leopoldov, inter krimuloj, pro falsa kulpigo pri provo fondi religian Bahaa-grupon. Proceso kontraŭ la studento Novobilský (tiam en Praha) en Ústí n.L. pro provo starigi kunlaboron de la Rondetoj en Ústí n.L. kaj Teplice v Čechách. D-ro Sáva Heřman: deviga forlaso de sia pedagogia posteno en la Filozofia fakultato. Mařík: ĝenata (kiel rondestro) pli ol du jarojn pro la 2-a punkto de Ŝustr-cirkulero (ke la Klubo transprenis iujn taskojn de la likvidita Asocio). Nur abdiko je la gvidposteno en EK ĉesigis la ĝenadon. (En Slovakio: Ed. Tvarožek: 2 j. da karcerio; Inĝ. Hofman; en Ĉeĥio: Laube en Roudnice: ĝismorta karcerio - daŭris 6 jarojn.) Dum 1949-1955 neniu eksterlandano povis viziti la klubon. Ĵurnalisto Jožka **Staněk** (politika respondeculo pri la restado de Verda Ĉaro ĉe UK Varsovio, 1959): ĝenata post la reveno li mortigis sin, poste liaj edzino kaj filino ... komuna kremacio. Enketataj de STB estis minimume jenaj: Jiří Havlík, Ant. Seemann, Eva Seemannová, J. Čichová (dum jaroj), kaj certe ankaŭ aliaj, kiuj timis ion diri pri tio al ceteraj. Evidentiĝis indicoj pri strikta kunlaboro de Miloš Rudolf, la klubestro post Mařík, kun STB. Sendube ankaŭ Pražák (eble nur pro aldevigo).

Malgraŭ la deprima ĝenado fare de STB eble ĉiuj - escepte de la EAĈSR - eksprezidanto Adolf Malík - restis fidelaj al la ideo de Esperanto, la ideo, pri kiu diris en la Praga Radio (1992) komeniologo d-ro J. Hýbl (direktoro de Komenský-Muzeo en Přešovce), ke ĝia patro estas nia granda Jan Amos Komenský.

La historio naŭdekjara de la Esperantista Klubo en Praha (la aprobita statuto nomas la lokon ĉeĥe: Praha) estas ankaŭ historio de generacioj. Estis etapoj de supreniro, post kiuj sekvis etapoj de cedo. Ŝajnas, ke ĝuste nun ni estas, influe de la "merkata ekonomio" kaj sekve de ega manko de financoj - kaj ankaŭ furora konkurenco de aliaj lingvoj naciaj - en nova etapo de cedo. Sed ni kredu, ke la sana kerno de la Movado restos kaj laŭpove agos.

Rilate la mondan Esperanto-Movadon ni menciuj la kontentigajn signojn: en 1992 okazis en la mondo (laŭ Heroldo de E.) 244 diversaj esperantistaj aranĝoj, kaj la "Pasporta servo" informas pri preskaŭ 900 familioj en la tuta mondo akceptantaj senpage vojaĝantajn esperantistojn. El la nombro de 244 entreprenoj 30 estis en la iama Ĉeĥoslovakio, el tio 23 en Slovakio kaj 7 en Ĉeĥio. Ĉirkaŭ dek mil esperantistoj kunvenas ĉiujare.

Per nia komuna laborado ni sekurigis verdan lumon sur nia plua vojo.

XXX

Mian alparolon finu nur kelkaj versoj el (iom longa) poema omaĝo al la Praga Klubo, ĝuste antaŭ 10 jaroj, okaze de ĝiaj 80 jaroj, el la plumo de Jiří Kořínek:

... okdek jaroj da ekzisto,
ok jardekoj da persisto,
kiujn Praga klub' liveris ...
kaj por la afer' oferis ...

Marŝu brave al la celo,
kiel torĉo kaj modelo!

Praha, 1992-1993

Bulteno vydávající:

Klub esperantistů v Praze
poštovní přihrádka 1069
íl 21 Praha 1

Klub esperantistů v Brně
poštovní přihrádka 154
657 54 Brno 2

Toto číslo připravili: J. Mařík, J. Patera (Praha); J. Vondroušek, M. Malovec, K. Daněk (Brno)

Naše knižní nabídka:

Ing. Jan Werner: Matematika vortaro (esp., ĉes., něm.)	39 Kč
Fr. Kožík: Lumo en tenebroj (pri Komenio)	26 Kč
Doktoro Johano Faŭsto (popola puptetraĵoj)	20 Kč

NOVINOVÁ ZÁSILKA

podávací pošta Brno 2

Snížené výplatné povoleno 7.3.1990

MS Brno, č.j. P/3 - 2982